Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Aŭstrio. — Telefono U 23-1-80

6-a jaro APRILO/MAJO 1951 n-ro 4/5

Kiel ni kongresos en Innsbruck

Kiel jam konate, la Aŭstria Esperanto-Kongreso okazos nunjare en la belega ĉefurbo de Tirolo, en Innsbruck, la grandurbo enmeze de odorantaj abiarboj kaj gigantaj montegoj, trafluata de la "verda" Inn-rivero. La LKK intence elektis por la kongreso la lastan semajnon de julio, ĉar ĝi opinias, ke, unue, multaj aŭstriaj Esperantistoj kaj E-amikoj, vizitontaj ankaŭ la UEA-kongreson en Munkeno, povos kunligi la veturojn al ambaŭ kongresoj kaj tiamaniere eviti duoblajn vojaĝelspezojn kaj, due, multaj eksterlandaj gesamideanoj konsideros la AEF-kongreson kiel antaŭkongreson de la 36a UEK kaj tial, veturonte al Munkeno, ŝatos antaŭe fari viziton al Innsbruck, la tirola ĉefurbo intermontara.

Se la kongresdaŭro ŝajnas iom longa, oni devas pripensi jenajn argumentojn: La kongreso komenciĝos fakte la 29.7. per la Solena Malfermo. La ĝisnunaj kongresoj sufiĉe pruvis, ke 3-4 tagoj estas tro malmultaj. Oni volas finfine ankaŭ povi spiri inter la diversaj kunsidoj kaj aranĝoj. La kongresanoj ne nur venos por sidi, labori kaj ŝviti inter la muroj de la kongresejo, sed ili ankaŭ volas ĝui la belecon de la urbo kaj la cirkaŭo, do labori kaj ferii samtempe. Oni ja ne faros tiajn veturelspezojn pro nur 3-4 tagoj. Ĉiu pripensu tion kaj ŝparu jam nun monon kaj libertempon por la "kongres-ferioj" en Tirolo.

Kiel kongresejon la Loka Kongresa Komitato gajnis la konatan grandrestoracion "Adamsbräu", kiu situas 2 minutojn proksime de la ĉefa stacidomo. Dum la tuta kongressemajno ties ejaro kaj la bela gastĝardeno estos je nia dispono, tial ĉiuj fakkunsidoj ktp povos okazi en la sama domo. La LKK klopodos starigi komunan kuirejon kaj ricevi bonajn amasloĝejojn, por ke la ges-anoj povu vivi sen multaj kostoj dum la tuta semajno. Same ni klopodos por ricevi rabaton ĉe la aŭstriaj fervojoj.

Neniu el la aŭstriaj ges-anoj forrestu de nia kongreso! Ĉiu memoru, ke la E-movado en Aŭstrio bezonas energian antaŭenpuŝon, efikan propagandon - kaj tio en la aktuala momento estas sol-scie l a a l m a n ĉ o d e l a v e r d a a r m e o a l I n n s b r u c k ! Ne nur Innsbruck aŭ Tirolo, sed ĉiu lingvano de Aŭstrio, eĉ la tuta mondo eksciu per la gazetaro, ke en la ankoraŭ ĉiam katenita Aŭstrio vivas multe da idealistoj, kiuj alten tenas la Verdan Standardon kaj malgraŭ la malfacilaj vivkondiĉoj senlace laboras por la disvastigo de Esperanto, tiu forta kaj efika rimedo kontraŭ malamo kaj malpaco inter homoj.

Kaj vi, batalantoj en la verda armeo de l'eksterlando, venu al nia kongreso kaj helpu nin, por ke nia propagando havu efikon speciale je la instruistaro, je la diversaj aŭtoritatoj kaj redakcioj kaj je la ankoraŭ grandparte flanke starantaj akademianoj. Ni komunforte konvinku ilin, ke Esperanto ne estas ludilo, sed io serioza, valorega kaj vivanta, pli valora ol la de ili adorata lingvo latina!

(El INFORMLETERO 2-3/51)

AUSTRIA ESPERANTO-KONGRESO 1951
en Innsbruck - Tirolo, 28.7.-2.8.

Kongresadreso: Aŭstria Esperanto-Kongreso 1951,
Innsbruck, poŝtfako 251.
Kongresejo: Grandrestoracio "Adamsbräu", Innsbruck,
Heilig-Geist-strato 16, telefono 3848;
tie estas ankaŭ la kongres-oficejo.
Kongreskotizo: kongresano aŭstr. sil. 25.--
familianoj " " 15.--
akcelantoj " " 30.--

Pagebloj: enlandanoj bv. pagi per poŝtenpagilo je la poŝtĉeka konto n-ro 80675 "Sparkasse der Stadt Innsbruck in Innsbruck" kun la indiko "2865 Esperanto-Kongresz".

Kongresprogramo: laŭ aldono al AER 2,3/51, respektive ricevebla ĉe la kongresa adreso aŭ la E-Centro, Vieno I., Neutorgasse 9.

Anonco: kiel eble plej baldaŭ por faciligi la laboron de la LKK!

KOMUNIKOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

KONDOLENCOJN AL SAMIDEANO HANS STEINER.

Kun profunda emocio ni devas al niaj legantoj peri la sciigon, ke nia kara samideano Hans Steiner pro grip-morto perdis sian amatan edzinon. Kun li dolorsentas nia tuta samideanaro.

LA ESTRARO DE AEF.

Inaŭguro de la PANTEONO de la E-movado.

Pro la daŭrigo de la balotoj por la aŭstria federacia prezidanto la inaŭguro de la Panteono estis prokrastata kaj okazos definitive je la 3.6.51. La solenaĵon malfermos s-ro federacia kanceliero ing. d-ro F i g l, UEA estos reprezentata per s-ano dir. Hans J a k o b, Ĝenevo. Ĉeestos ankaŭ multaj reprezentantoj de gravaj institucioj. Speciala poŝtoficejo kun speciala poŝtstampo estos instalata. Jen mallonge la programo: Sabate, 2-6-, 19a vespere Salutvespero (Vieno I. Schottengasse 1, WOK-restoracio). Dimanĉe, 3.6., 9a atm. Katolika Diservo kun prediko en E. 10a atm.: INAUGURO DE LA PANTEONO (I., Hofburg-Michaelerplatz, enirejo sub la kupolo, en la Internacia E-Muzeo). 13a ptm.: Komuna tagmanĝo (I. Schotteng., WOK). 15a ptm. AEF-Laborkunsido (E-Muzeo). 17.30a: promeno tra la interna urbo. - Gesamideanoj! Multnombre ĉeestu la eminentan Esperantistan okazaĵon!

D-ro Tadros M e g a l l i en Aŭstrio!

S-ano d-ro Megalli, la konata egipta prelegvojaĝanto, alvenis en Aŭstrio. Post prelegoj en Salzburg, Tirolo

kaj Supra Aŭstrio li restos inter la 23.5. kaj 7.6. en Stirio kaj estos de la 8.6.-17.6. en Vieno. Ekde la 18a de junio li sin disponigos al la ges-anoj en Malsupra Aŭstrio, Burgenland kaj eventuale denove en Vieno. Al s-ano Hans Steiner, Tirolo, li skribis: " ... volonte mi restos en Aŭstrio ĝis la kongreso en Munkeno. Mi legis multon pri la bela Tirolo kaj la gaja urbo Vieno kaj tre ege ŝatus resti kiom eble plej multe inter la gajaj aŭstroj". Kiu estas s-ro Megalli? Li estas 38jara egipto, naskiĝis en la urbo Fajum apud Kairo kaj loĝas deantaŭ longa tempo en Kairo. Laŭ profesio li estas ĵurnalisto kaj laboris ĉe granda araba gazeto, por kiu li tradukis artikolojn el la angla kaj franca lingvoj en la araban. En Kairo kaj en tuta Egiptio li estas konata E-isto. Li fondis la tiean E-movadon. Germanaj gazetoj skribis tre laŭdajn artikolojn pri li kaj liaj sukcesoj. Li estas tre modesta kaj neniam prezentas sin "d-ro" Megalli. - La grupoj kaj E-aktivuloj, kiuj ankoraŭ deziras - kaj ili d e z i r u ! - aranĝi prelegojn (vidu AEK 2,3/51) p. 11) bv. t u j interrilati kun s-ano Hans Steiner, Worgl, Augasse 42, ĉar li impresarias la aranĝojn de T. Megalli.

N I A M O V A D O E N A Ŭ S T R I O

VIENO: La Naturamika Esperanto-Fakgrupo en Vieno aranĝis kun la Viena Esperanto-Delegitaro la 17.3.51 LUM-BILDPAROLADON de s-ano Karl N i g l , AEF-landestro de Supra Aŭstrio, el Linz pri "Vojaĝo de Linz al Danlando". La parolado, kiu okazis en la Naturamika Domo de Vieno , logis pli ol 60 geesperantistojn al la kunveno kaj montris humorplene la travivaĵojn de la karavano dum la aŭtobusa veturado kaj la koran akcepton inter niaj danaj samlingvanoj. La fondinto de la Aŭstria Turisma Esperanto-Centro rikoltis dankan aklamon. Ni deziras al s-ano Nigl por la ĉijara aŭtobusa vojaĝo al Nederlando bonan sukcesoń. (Hugo Braun). --- En la popolklerigа instituto Alsergrund la 21.4.51 okazis legado de ekstraktoj el la trilogio "Genio kaj Prudento savas la mondon" de d-ro Paul Klemperer, Vieno-Novjorko, kiu entenas ankaŭ la ideon de la tutmonda aplikigo de Esperanto. Nia lingvo estis inde menciata kaj dum la posta diskuto, kiun el la Esperantistoj partoprenis s-anoj Mudrak, Vokal kaj Sinner, tiu lasta, sekvate de atenta intereso de la ĉeest-

intaro, kun bona efiko rakontis pri siaj spertoj per Esperanto en Ruslando kaj kun japanoj post la unua mondmilito. La arango, prezentita de d-ro H. G. M a r e k kaj Burgschauspieler Fred L i e w e h r , traktis la temon "Repacigo de la mondo", kiun ni jam priparolis en AER 5-6/1950, p. 37, kaj ebligis al niaj kolegoj ankoraŭ poste, kiam oni grupe kune staris por diskuti la ideojn de d-ro Klemperer, pledi kaj varbi por nia afero. --- La E-grupo HARMONIO la 30.3.51 okazigis por siaj membroj kaj gastoj du montradojn de lumbildoj: s-anino Mathilde Kindl prezentis kolorbildojn pri la lastaj kongresoj en Parizo kaj Bournemouth kaj pri la belaj regionoj de Aŭstrio, kaj s-ano majoro Oskar Sinner projekciis serion da kolordiapozitivoj pri sia familia vivo kaj belegaj floroj. - La balotoj dum la ĉijara ĝeneralkunveno donis la fidon al jena estraro: estroj E. Vokal, G. Loibel; sekr. M. Loibel, H. Prakesch; kas. M. Ohrenberger, Chr. Mazak; bibl. Fr. Schober, St. Krautschneider; kontr. V. Mann, W. Froidl; prop. E. Vokal, Fr. Ohrenberger; arangoj Fr. Schober, Fr. Ohrenberger, l. Bartek kaj konsilantoj dir. Fr. Menacher kaj H. Bauer. - El la raporto pri la jarkunveno oni kromе ekscias, ke la membrostato estas 38, ke la biblioteko registras 126 librojn, ke la grupo ĝuis la viziton de kvar eksterlandaj s-anoj. La grupo funebras la morton de sia membro s-ano Ferdinand Schmidt, fervojisto, kiu forpasis la 22.6.50. Memorindaj estas vortoj de s-ano Gustav L o i b e l , kiu, karakterizinte la krizan staton de la movado, akcentis, ke "tamen ni devas plulabori por povi respondeci antaŭ la konscienco: mi faris, kion mi povis fari kaj ne kunkulpas pri la malfeliĉego de la homaro!" --- Ĝenerala Kunveno de la grupo KONKORDO okazis la 6.3.1951. Niaj s-anoj en la Xa distrikto nun havas 15 ordinarajn kaj 15 subtenantajn membrojn. K-do Johann K r a l metis la estrecon en la manojn de la juna kaj aktiva s-ano Helmut Illetschko. Kdo Kral, kiu sindone gvidis la grupon dum periodo de granda malfaciloj, estas unu el la kunfondintoj de ĝi kaj li kiel fervora aganto por la afero de E restos plu ĝia plej fortika pilastro. La nova estraro estas formita el ges-anoj Illetschko (estro), Reitermeier (sekr.), Ivan Hermine (kaso), Haiderer Rosa kaj Ocelka (kontr.), Kral (bibl. kaj VED-deleg.), kaj

s-ano Struger. --- E-kluboj KALOCSAY-LABORO jarkunvenis je 8.3.51. Membrostato: KALOCSAY 13, LABORO 27. Meznombra vizito 11 personoj po klubvespero. Biblioteko: 357 verkoj. La klubkotizo restis nesangita, sed oni decidis enkasigi, subtene al AEF, libere donatan pluson de 50 g po monato. La balotoj: honorprezidanto prof. d-ro Koloman Kalocsay, honormembroj s-anoj Wilhelm Ullrich kaj ofickons. Carl Gasperini, prezidanto d-ro Nikolao Hovorka, - afergv. prez. Hugo Kraus kaj Robert Novaček, kasistino Olga Wratny, biblioteko kaj VED-delegito R. Novaček, kontrolo F. Dvorak kaj v. Peschl. - La kluboj projektas la ellaboron de moderna E-ekspozicio, starigebla kiel faldekrano okaze de neesperantistaj kongresoj kaj arangoj kaj petas pri subteno flanke de la Esperantistaro per materialo kaj praktika helpo.-- NACHRICHTENBLATT DES INTERNATIONALEN ESPERANTO-MUSEUMS IN WIEN, informilo de la IEMW, turnas sin propagande al la neesperantista publiko. Interesitoj mendu gin ce Internationales E-Museum, Wien I., Hofburg, unter der Kuppel. La muzeo ekspedis E-lingvan traktaton pri "Tutmonda Pasporto", riceveblan ce la sama adreso. -- Okaze de la 34a datreveno de la morto de nia Majstro s-ano Hugo Kraus faris de radio Vieno 15 minutan paroladon en germana lingvo sub la titolo"Zamenhof grandulo de l' homaro".

MALSUPRA AUSTRIO: En Payerbach-Reichenau nia senlaca aktivulo s-ano J. Hubalek arangis E-kurson por komencantoj, kiun partoprenas 8 personoj, inter ili 3 postistoj. -- En Gmünd s-ano K. Koller, kiu lernis Esperanton aŭtodidakte, instalis kurson por la tiaj filatelistoj. Ni dankas al tiuj bravuloj kaj deziras al ili la meritatan bonan sukceson! --- Nia egipta s-ano d-ro M e g a l l i espereble parolos en jenaj lokoj: St. Pölten, Wr. Neustadt, Hohenberg-Furthof, Wieselburg, Hainburg, Reichenau kaj Felixdorf. Esperu ni per tiuj prelegoj prosperon, novajn sukcesojn kaj entuziasmon! --- Raporto pri la jarkunveno de la E-Societo Wr. Neustadt komunikas jenan novan estraron: estro - Gustav Schmid, kasisto - Walter Halling, sekretario - Franz Schügerl. La grupo nombras 17 anojn, sed oni plenforte penos por pligrandigi la anaron. Post fino de la cefkunveno societano

Hubalek montris belegajn kolordiapozitivojn, inter kiuj estis ankaŭ fotoj de la pasintjaraj ekskursoj de la socieco. Korespondadreso: Gustav Schmid, Wr. Neustadt, Wöllersdorferstr. 25/II/6. --- La E- grupoj de St. Pölten, "Voith-Uzino" kaj "Nova Tempo" aperigas komunan informilon. Suplemento enhavas komunan korespondleteron hektografitan, per kiu la grupanoj, dezirantaj korespondi, povas ŝpari afrankon.

SUPRA AUSTRIO: Konsilojn pri somerrestadejoj kaj travojago en SALZKAMMERGUT tre volonte donas la aktivema Esperanto-grupeto "Traunstein", Gmunden, Tagwerkergasse 2, afergvidanto s-ro Anton Pöschke, financoficisto. Ni cerpas el letero de s-ano Pöschko: "Nia grupeto estas tre malgranda, sed ofte vizitas nin eminentuloj el la E-movado de la en- kaj eksterlando. Ni estas ankaŭ tre gastemaj kaj samideanoj kaj gastoj estas ĉiam kore invitataj ĉe la bordoj de la verda, bela Traun-lago! Nia estro estas s-ro Wolfgang Grausgruber, frizisto, Gmunden, Bahnhofstrasse. Al la kongreso en Innsbruck intencas partopreni unu s-ano." --- INFORMLETERO 1/51 de la AEF-Landestro Nigl raportas pri la jarkunveno de la Landa Organizo Supra Austrio, kiu okazis la 25.2.51. Reprezentitaj estis la grupoj "Hilde Diller" (Vöklabruck), "Verda Stelo" (Steyr), "Estonto", "Fervojista Fakgrupo", "Esperanto-Turisma Centro" kaj "Vojaĝklubo" (Linz) kaj "Libereco" (Wels). La grupoj donis kontentigajn raportojn kaj oni ĝojis speciale pri la sukcesoj de la vojaĝentreprenoj el Linz. La opinio pri la "Vojaĝklubo" estis unue skeptika, sed oni ekseciis, ke ĝi montras viglan jam evoluon kaj havas jam 27 junajn membrojn. La nova landestraro formiĝis jene: landestroj K. Nigl, Linz, kaj H. Zeller (Steyr), kasisto M. Hollinger, Linz, sekretario L. Kaufmann, Linz, kontrolistoj E. Moser, Wels, kaj A. Teufelsbrucker. Urfahr La jarkunveno akceptis unuanime proponon, sendi al E-Centro 200.-- S. Informletero 2/51 jen komunikas alvokon al la s-anoj en Supra Austrio por preparo de propaganda agado okaze de la kunjara, de la 3a gis 13a de aŭgusto en Ischl okazonta 7a SKOLTA KONDĴAMBOREO. La helpopretaj s-anoj anoncu sin tuj ĉe s-ano Leopold Kaufmann, Linz 1, Postfach 156.

* * * C E R T E V E N U A L I N N S B R U C K ! * * *

STIRIO: En Knittelfeld okazis tre sukcesa renkonto de la aŭstriaj fervojistaj Esperantistoj, kiu estis aranĝita de la loka E-klubo "Verda Stelo". Ĉeestis multaj gastoj el la federaciaj landoj, inter ili eĉ reprezentantoj el Landeck, Linz kaj Vieno. El la lokaj aŭtoritatoj s-ano Zuber, la vigla estro de la grupo, povis saluti la urbestron, s-ron Fortnig, kaj komunuman konsilanton Böcksteiner. - Ambaŭ sinjoroj varme aklamis ĵa celadojn de la Esperantistoj, por kiuj AEF-landestro d-ro H a l b e d l kun konvinka elokventeco estis pledinta. La programo estis agrable varia. Ni legis pri la komenco per la verva marŝo "Malnovaj kamaradoj" kaj alternantaj muzikprezentaĵoj de la brava kapelo Gallmaier kaj la kantsocieto "Liederfreiheit" (Kantlibereco) kaj pri gajaĵoj, poemoj kaj kantetoj donitaj de s-roj Morak kaj vicestro Ottenschläger, kaj junĉarmulinoj Anny Paier kaj Helene Kaltenegger. La arangon partoprenis ankaŭ fakgrupestro S i g h a r t n e r kaj sekretario Z i n k .

SALZBURG: El Salzburg venas informo pri la plenkunveno de la AKLE-grupo "Estonteco". Oni elektis jenan estraron: prezidanto - Josef Kaps, vicprez. - Heinrich Reiter, sekretario - Otmar Weber, kasistino - Lisbeth Fischer. La grupo estas ankoraŭ juna kaj klopodas plifirmigi sian financan bazon. La nuna membraro konsistas el 19 anoj.

TIROLO: La klubo "Pioniro", Kufstein, la 27.1.51 aranĝis sian ĉefkunvenon. Kiel klubestron oni elektis la fondinton kaj unuan klubestron, s-anon d-ro Huber Alfons, kaj la nuna klubestro, s-ano Hermann Viesneider, kiu pro profesiaj kaŭzoj ne plu povis kiel estro gvidi la klubon, bonvolis akcepti la vicestrecon. Dua vicestro elektiĝis s-ano polica distriktinspektoro August Kaufmann. La kroma estraro konsistas el jenaj ges-anoj: Karl Scheiflinger, Traudl Funkhauser (kaso), Hilde Führer, Irmgard Dalpiaz (sekretariinoj) kaj ĉefinstruistoj Wex kaj Stöckl (revizoroj). Dum la kunveno, kiun partoprenis 17 personoj, s-ano AEF-landestro S t e i n e r parolis pri la ĝenerala situacio de la tirola movado. La momentan stagneton de la vivo en la grupoj li atribuis al la influo de la aktualaj politikaj cirkonstancoj.

La Esperantogrupo Innsbruck havis sian ĝeneralkunvenon je la 2a de marto. La prezidanto de la grupo, s-ano Esperantolektoro d-ro Leo B l a a s , en sia malferma parolado esprimis sian esperon, ke en la nova agperiodo oni sukcesos atingi pli grandan varbefikon por atentigi la publikon pri nia lingvo. Tio estas speciale grava pro la instruo en la lernejoj kaj la universitato. S-ano Franz Mitterberger, vicprezidanto, donis modele kompilitan jarraporton, el kiu evidentiĝis la notinda aktivado de la Innsbruck-aj ges-anoj. Ni rimarkigu la viglan ekskursemon de la grupo kaj sukcesan gastigadon de grandaj eksterlandaj vojaĝgrupoj kun aranĝo de amuzvesperoj, dum kiuj muzikprezentaĵoj kaj popoltipaj dancoj konigis al ili karakterizajn trajtojn de tirolaj moroj kaj la tirolan gajecon. La elektoj rezultigis sekvantan estraron: d-ro L. Blaas, H. Mitterberger (prezidantoj), Johanna Stobich, E. Felser (gesekretarioj), J. Bauer, J. Richter (kasistoj) kaj d-roj Karner kaj Rumesch (revizoroj). Ni gratulas al la grupo pro la bela laboro! (Red.).

Novelekto en la E-grupo Solbad Hall konsistigis la estraron jene: estro: eksofickonsilanto K. Koller, sekr.: s-ino Adele Koller, kasisto: E. Vorlaufer. Adreso de la grupestro: Thurnfeldstr.4, Solbad Hall, Tirolo. - E-grupo Wattens elektis al si jenan estraron: Otto Steiner, estro, Amalie Schmid, sekretariino, Lorenz Perktold, kasisto.

"COSMOPOLYT", la 12-paĝa germanlingva gazeto, estas unu el la plej fidelaj monataj aperaĵoj, kiuj regule apenaŭ rigas 2 paĝojn pri Esperanto. Sub la titolo "Eŭropo, ĉu vi ne hontas?" s-ro d-ro Karl F r i e d l , vicdirektoro de la Stiria Landa Biblioteko en Graz, en la aprila n-ro de la gazeto skribis artikolon pri la E-movado en la malnova kaj nuna Ĉinio kaj montris, ke la ĉina popolo pli multe uzas Esperanton ol la eŭropanoj. Ĉar tiu periodaĵo ankaŭ batalas por sia ekzisto, s-ro AEF-landestro Steiner apelas al ĉiuj idealistoj, por ke ili abonu ĝin. La ĉiupaĝe tre interesa gazeto kostas por tri n-roj (kvaronjare) S 3.60. Abonu ĉe: Verwaltung des Cosmopolit, Imst, Tirolo. --- INFORMLETERO(ILO), la monata organo de la AEF-landestro Hans Steiner, kiu modele interligas la tirolan kun la aŭstria kaj internacia E-movado, estas abonebla kaj aboninda ĉe la eldonanto, Augasse 42, Wörgl, kaj

kostas por la tuta jaro (12 n-roj) S 10.--, respektive 6 internaciajn respondkuponojn.

Solena E-kursfino en la Instruista Seminario de Innsbruck. La 16.3.51 finigis dum ceesto de la instituta direktoro prof. d-ro Baldauf la unua E-kurso en instruista seminario de Aŭstrio, kiun nia movado devas danki al s-ano Hans Steiner, kiu (ni jam raportis pri tio) ne evitis oferi sian tempon kaj monon, trajnveturante ĉiun vendredon post la dejoro 135 km por plenumi sian libervole transprenitan instrutaskon. La lernatestoj, kiujn transdonis la direktoro al la partoprenintinoj mem, portas la subskribon de d-ro Baldauf kaj ankaŭ tiun de s-ro Steiner. S-ro direktoro parolis tre korajn vortojn por Esperanto kaj promesis la kontinuadon de la instruado en aŭtuno. Kvar seminarianinoj estis distingataj per libropremioj: f-inoj Egger, Gundolf, Hackl kaj Teicht. Aliaj 2 kursaninoj, la f-inoj Schipflinger kaj Zobl, kiuj estis premiataj pli frue, pro gripmalsano ne povis fari la lastan ekzamentaskon. La studentino Hackl en bela, senerara Esperanto dankis al la instruinto. Sia belega prononco sonis kiel muziko. Koran gratulon al s-ano Steiner! (La redakcio).

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

AKLE/Vieno, leteradreso: W. Mudrak, Vieno 3. Beatrixg. 19 Kunvenejo: l., Graben 13/25 (Kreuzbundheim) ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato, 17-19 h. Samloke ĉiumarde 19-20.30 h elementa kurso.

Aranĝoj: 27.3. - Pasko-Soleno; parolis inter aliaj kiel kara gasto d-ro P. Hohenwarter el Klagenfurt/Tanzenberg, pri Esperantolaboro en scienca medio. 8.4.-Diservo en la kapelo de Kath. Gesellenverein, 6., Gumpendorferstr. 39 kun E-prediko de P. komandoro Plank. 10.4. Zamenhof-memoro. 24.4. Katolika socia agado (60 jarojn "Rerum novarum).

La XXIIIa Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj okazos samtempe kun la 36a UEA-kongreso en Munkeno. Aliĝu ĉe pastro Ludwig Thalmaier (13b) Bad Kohlgrub, Germanlando, post pago de via kotizo de S 15.50 (geedzoj pagas nur unu kotizon, gejunuloj S 7.50) al supra Viena

adreso, respektive ja poŝtŝparkasa konto 105.713 (Walter Mudrak, Wien).

Raportis pri la IKUE-kongreso en Romo detale "Die Freiheit" de 24.2.51 kaj "Der Weg" de aprilo 1951. M.

NATURAMIKA FAKGRUPO

En la jarkunveno de la E-fakgrupo de la Turista Asocio "La Naturamikoj", kiu okazis dum ĉeestado de la vicprezidanto de AEF, s-ano d-ro Grimme kaj la estro de la Viena E-Delegitaro, s-ano E. Vokal, s-ano Finkenzeller, estro de la fakgrupo, raportis pri la pasintjara agado, ke ĝi estis kontentiga. La fakgrupo iniciatis multajn ekskursojn, kiuj estis volonte partoprenataj ankaŭ de nemembroj. La nova estraro estas reprezentata de jenaj gesanoj: estroj - Max Finkenzeller, F. Plazotta; kasistinoj - Emma Plazotta, Lotte Karasek; sekretarioj - Hugo Braun, E. Vitek; kontrolistinoj - Marie Trista, Maria Eichinger; ekskursgvidantoj - Otto Hurny kaj M. Finkenzeller. - La Vienaj Naturamikoj, kiuj estas Esperantistoj, estas petataj, ke ili pagu siajn jarkotizojn ĉe la Esperanto-fakgrupo! Braun, sekretario.

La Naturamika Fakgrupo sukcesis aranĝi veturadon per aŭtobuso kaj restadon en Munkeno inter la 4.8.-11.8. okaze de la UEA-kongreso je la malalta prezo de S 300.-. Tiu prezo entenas la kongreskotizon, la veturadon kaj la noktrestadon. La prezo por familiano estas S 260.--.

I N T E R N A C I A E S P E R A N T O - M O V A D O
Zigzage kaj telegrame tra la mondo

URA FINE DE FEBRUARO 1951 jam notis 7011 pagintajn membrojn; la respektiva nombro fine de februaro 1950 estis 6429. Danke al la financa subteno de UEA aperis antaŭ nelonge hebrea eldono de la Zamenhofa Ekzercaro. --- LA ALIĜOJ POR LA 36a U.K. EN MUNKENO transpasis jam la unuan milon. Ĝis 14.3. ilia nombro estis precize 1001 el 28 landoj. -- ĈINAJ ESPERANTISTOJ EN PEKING bonvenigis oficialan delegacion de Ĉeĥoslovakio. - EN LA PUBLIKAJ LEHNEJOJ DE BRAZILA ŜTATO Rio Grande do Norte Esperanto est-

is enkondukata kiel fakultativa fako. -- LA RADIOSTACIOJ DE PARIZO kaj PERPIGNAN-ROUSSILLON sendas Esperantokursojn. Elsendoj "Novaĵoj en E." okazas ĉiusabate de la nederlanda radiostacio Hilversum. Ili okazas tuj post la nederlandaj novaĵ-informoj, kiuj komenciĝas je la 23a h kaj daŭras 10-15 minutojn. Dum la unua kaj tria jarkvarono tiuj elsendoj estas aŭdeblaj sur ondlongo 298 m, dum la dua kaj kvara sur la ondlongoj 402 m. - EN LA UNIVERSITATO DE AMSTERDAM nun estas instruata ankaŭ nia lingvo de la konata E-instruisto advokato Sigismondo Pragano el Bukureŝto. --- LA ĈEĤOSLOVAKA POŜTO eldonis bildkartojn kun Esperanto-tekstoj. -- INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO TJO okaziĝas sian ĉijaran kunvenon en Haarlem, Nederlando, de 26.7.-2.8. La programo estas varia kaj loga. Interesitoj petu informojn de s-ro C. Geurts, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando. - LA 24a KONGRESO DE SAT okazos de 28.7.-3.8. en Stokholmo, Svedio. Korespondadreso:k-do Yngve Nilsen, Förvaltarvägen, Enskede. --- KULTURA REVUO pri aktualaj problemoj de la kultura progresado de Slovakio aperas nun presite. La interesa gazeto nun estas senpage liverata de la redakcio: Bratislava, Oktobrove nam. 12. -- LA HISPANA ESPERANTO-MOVADO enla pasinta jaro esperige progresis. "Boletin", la taŭga gazeto de la movado, kiu brilas per bonega stilo, en resuma artikolo montras la antuziasmon de niaj hispanaj amikoj, kun kiu ili replantas la verdajn standardojn en siaj urboj. En Madrido diligenta agado, en Zaragozo staras sur fortaj piedoj la grupo "Frateco" la sola en tuta Hispanio, kiu dum pli ol 30 jaroj ne ĉesis funkcii, treege kontentigas la laboro en Katalunio kun Barcelono kaj Terrasa, elektita kiel unua postmilita hispana E-kongresurbo, Santander kaj Bilbao en la nordo bone partoprenas en la koncerto. En Andaluzio kun Seviljo ĉefronte diversaj amikoj semas konstante la karajn ideojn de nia idealo. Sur Kanariaj Insuloj funkcias rondeto de kompetentuloj, kiu montras la utilon de E. eĉ en universitataj medioj. En Valencio zumas la motoro de la tutlanda organizo kaj specialan rimarkon meritas la laboro en Cheste, urbo, konata inter la hispanaj s-anoj kiel la "Meko de la Esperantismo". Tie en la ĉefa teatro, ĉiam plenŝtopita de entuziasma ĉeestantaro, la kapablaj aktivuloj, instruante kurson post kurso, bakas centojn

da fervoraj E-junuloj kaj (laŭ la vortoj de Boletin)"be= laj - belegaj!" - junulinoj, kiuj apud malnovaj pioniroj estas hela promeso de triumfonta generacio. En Valencio oni luis belan ejon por kursado kaj prelegado. Cetere, dise tra la lando, multaj izoluloj en vilaĝoj kaj urb= etoj zorgas por forigi sian izolecon kiel heroldoj de la alta ideo de Zamenhof. --- LA ESTRARO DE LA RADIOFONIO DE ANKARA diskutas pri dissendoj en Esperanto. Subtenu la eneterigon de E. en Turkio, pledante skribe por ĝi al Basin-Yagin, genel Müdürlügü, Ankara! --- EN LA UEA-KON= GRESO DE MUNKENO funkcios vartejo por infanoj. La kon= gresanoj do povos kunpreni siajn idojn kaj tamen estos liberaj por ĉiuj aranĝoj de la kongreso. --- VIVAS NIA MOVADO EN VIETNAM!Kontaktu kun la Sudvietnama Esperanto-asocio per la adreso: Revuo Thong-Nhut-Nambbo, c/o. Mr. Nguyen duc Quy, Vietnam Representative 122 Sathorn Road, Bangkok, Thailand. LEKTORATO DE ESPERANTO ĈE ALTA KOMER= CA LERNEJO EN BRATISLAVA havas en vintra semestro 1950 / 1951 7 studantojn, t.e. pli ol havas en tiu ĉi semestro la lektoratoj rumana, itala, hispana kaj franca. - AL LA IIa UNIVERSALA KONGRESO DE PACDEFENDANTOJ EN VARSOVIO, kiun vizitis 2000 delegitoj el 81 landoj, pertoprenis an= ŭaŭ Esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Brazilo, Nederlando , Italio, Islando kaj Danlando. Islanda s-ano Torberge pa= rolis al la kongreso en Esperanto, pri kio raportis la polia gazetaro. Flugante tra Praha, la delegitoj estis akceptitaj de esperantlingva oficisto de la Ministerio por Informoj. -- LEKTORATO DE ESPERANTO funkcias en la Teknika Altlernejo de Praha. --- PRI LA VIIIa E-KONGRESO DE ĈEĤOSLOVAKIO en Brno 1950 estis produktata aparta filmo. LA GEPATRA FAKSEKCIO DE LA GERMANA E-ASOCIO el= donas specialan bultenon, kiu enhavas valorajn diskutojn pri la temo "Esperanto kaj la familio". - INTERNACIA KO= MISIONO "ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO" alvokas interesitojn por kunlaboro: sekretario estas C.J.Keur, Moerweg 76,Den Haag, Nederlando. -- LA ESTRARO DE UEA akceptis la invi= ton de la urbestraro de Oslo kaj de la Norvega E-ista Ligo, okazigi la 37an Universalan Kongreson de E. dum aŭgusto 1952 en Oslo. - Laŭ informo de UEA la ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO komunikis la 31.12.1950 sian eksiĝon el UEA (ni citas, red.) "por helpi plifort=

igon de la esperantista movado en nia ŝtato kaj en la ceteraj landoj de popola demokratio". -- LA 15a JUGOSLAVA E-KONGRESO okazos de 7.-10. de julio en Ljubljana. En ĝia kadro okazos internacia somerrestado en plej belaj turismaj lokoj de Slovenio kaj vizito de la Adriatika maro. Kondiĉoj estas jenaj: Al ĉiuj interesitoj Slovenia E-Ligo prizorgos kaj pagos la vivtenadon kontraŭ garantio por egaltempa gastigado de unu jugoslava E-isto en la lando de la partoprenonto aŭ alsendo de diversaj libroj (eventuale de pluraj ekzempleroj de unu libro). Vojaĝkostojn pagos la vizitonto mem. Kontaktu kun Slovenia E-Ligo, Ljubljana, Cankarjevo nabr. 7/1! --- URBO MUNKENO eldonas specialan esperantlingvan prospekton pri Munkeno. Postulu jam nun tiun senpagan prospekton ĉe Städt. Verkehrsamt, München, Sonnenstr. 24. --- NURNBERGA POSTKONGRESO 1951 (E-grupo Nürnberg, Mögeldorfer Hauptstr.2)invitas por aligo. Ĝi okazos de 11a-13a de aŭgusto. Eldoniĝis lerte kompilita faldprospekto. - BELA FALDPROSPEKTO pri Bratislava aperis ĉe Slovakotour, Bratislava, Reduta. --- JUNULOJ ESPERANTISTAJ, 15-19jaraj, partoprenemaj al "Internacia migranta kolonio", kiu okazos de 17.7.- 4.8. ĉe la okcidenta marbordo, kun vizito de Parizo, anoncu sin tuj al s-ino Jeanne Dedieu, 3 Rue Arzac, Toulouse, Francio.

K o r e s p o n d o : Fervora E-istino el Innsbruck Rozo W i e n d l , dumtempe restanta en Svedio, bezonas urĝe bildkartojn el ĉiuj regionoj de Aŭstrio por fari lumbild paroladojn pri Aŭstrio. Ŝi promesas redoni ilin laŭ deziro. Adr.: Rozo Wiendl, ĉe familio Kvist, DEJE, Box 109a, Svedio.

Kiu estas la ŝtelisto?

Vojaĝinto tra Hindio rakontas:

La plej multaj vilaĝoj tie ĉi havas sian "ŝtelistokaptiston", tio estas viro, kiu estas detektivo, psikologo kaj sorĉisto en unu persono. Kiam al iu el miaj hindaj soldatoj estis ŝtelita la papermonujo kaj el la esploroj evidentiĝis, ke la ŝtelinto nur povis esti unu el la sep samtendanoj, mi venigis al mi Ambika Das, la ŝtel=

istokaptiston de la vilaĝo.

Li aperis je la sepa matene, adresis al la soldatoj la kutimajn demandojn kaj diris: "Nun mi devas foriri kaj pripensi. Morgaŭ ni jam havos lin." Vespere li venis denove kaj diris al la soldatoj: "Jen mi havas sep bastonojn, ĉiu estas sep colojn longa. Ĉiu el vi metu ĝin sub sian kapkusenon. Morgaŭ unu el la bastonoj estos je du coloj pli longa kaj tiam mi ekscios, kiu estis la stelinto."

La soldatoj, videble konfuzitaj, reiris en la tendon.

Ĉu vi efektive kredas je tiu sencensaĵo?" mi -mokediris. Ambika Das ridetis enigme. "Eble ne, Sahib, tamen vi vidos, ke la ŝtelinto anoncos sin."

La sekvintan matenon Ambika Das venis kaj kontrolis la bastonojn. Poste li montris per fingro al unu el la soldatoj. La viro tuj konfesis esti la farinto. Li estis mallongiginta sian bastonon je du coloj.

Jen iam kampulo Wurzinger ...

Jen iam kampulo Wurzinger renkontis sian amikon sur la strato. "Saluton!" li diris. "ĝojige, ke oni vin fine revidas! Kie vi do restadis ĉiam kaj kiel vi fartas dum la sankta edza stato?"

"Inter ni mi konfesu - mallonge. Karulo, per tio mi faris egan mispaŝon. Ŝi ja estus tute ĉarma ulineto, mia edzino; ŝi estas nur tiel ege severa, tiel ege severa. Mi ne fumu, mi ne trinku bieron, mi ne trinku vinon kaj foriri vespere mi kompreneble tute ne rajtas."

"Nu, tial vi do la edzigon forte pentis, ĉu ne?"

"Ho ne! Penti mi ja ankaŭ ne rajtas!"

(Franz Resl)

* * *

N I K O R E K V I T A N C A S :

Donacoj por la propaganda fonduso (ĝis 15.2.1951):

Grupoj: Centro S 30.-, AKLE S 10.-, Fervojistoj S 20.-, Laboro S 20.-, Suno S 100.-, M.Hütter S 5.-, Angerer 35, E.Werner S 10, P A.Schmitt S 10, Illetschko S10, Mikunda S 15. - Entute S 235.--.

Vbb

(Zl. 3216/47)

Donacoj por la konservado de la Esperanto-Centro: Arbinger S 7, Klebel S 10, grupo Laboro S 20, Ziwutscnka S 10, grupo St. Pölten S 100, grupo Danubio S 70, grupo Harmonio S 80, dir. Kaftan S 50, S. Schwarz S 50, sennome S 100, E. Werner S 90. - Entute S 587.--.

Kromkotizon de 50g po membro kaj monato pagas la grupoj: Verda Stelo, Gaswerk Wien, Konkordo, Laboro-Kalocsay, Knittelfeld kaj Centro.

* * *

En la Esperanto-eldonejo

"T R A M O N D O"

Vieno I., Neutorgasse 9

estas inter aliaj haveblaj jenaj libroj:

Faŭsto I	S	39.--
Leteroj de Zamenhof	S	49.--
Leteroj de Lanti	S	20.--
Vivo de Rosa Luxenburg	S	33.--
Plena Vortaro (de S A T)	S	65.--
La nuna stato de l' evoluismo	S	15.--

G u t e B ü c h e r bekommt man in jeder Buchhandlung.

Warum sollst Du trotzdem a l l e B ü c h e r nur bei T R A M O N D O, Wien I., Neutorgasse 9, Tel.: U 23180, besorgen? Weil Du damit die Esperantobewegung förderst!!

* * * * * * * * * * * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a